



— LA VERDA KORO —



绿心

湖北省黄石市世界语协会

愿“绿心”也属于您

——《Verda Koro》中译本序言

《绿心》是蜚声世界语文坛的名家名作。它有着许多不同于一般作品的特点，格外引起广大世界语读者的喜爱。其最显著的特点，可以用de、en、pri、por四个词来概括。

首先，它是由世界语者写的（de）。作者尤里·巴基是匈牙利久负盛名的世界语诗人和作家，他的作品，属于每个世界语者必读的范本。

其次，它是用世界语写成的（en）。文字流畅生动。

其三，它是写世界语者的（pri）。内容亲切感人。

而且，它是特意为（por）世界语者，特别是初学者而写的，用心格外难得。

它所设想的对象，是学完了基础课程而又有志于继续提高和深造的世界语者。这一部份人，在世界语者的队伍中，实在是占多数而又极其重要的一个部份。他们面临的困难，就是没有合适的读物。绝大多数世界语出版物，对于他们来说，不是太深就是太浅了，这种情况，使得一部份人难以跃过龙门，成为真正成熟的世界语者。

大家都知道，定做的衣着最合身，定做的食物最可口，定做的用具最合用，所以我们有一切理由相信：定做的读物也最合适！

这本著作，虽然是为进修班写的读本，但它本身又是一部小说。它经过文学的艺术加工，却又并非完全虚构。从这本书

中，可以看到作者的，也可以看到你、我、他的影子。它既有世界语语言的学习，又有世界语者品德的修养；它情节连贯，由浅入深，循序渐进，寓复习于不知不觉之中，施熏陶于潜移默化之际，集思想、趣味、容易性于一体，读来兴味盎然。学完本书，读者可以增加词汇量 940 个，并且复习完世界语全部基本语法。

《绿心》的成书，本身又是友谊和合作的纪念。另一位世界语大师 Kalocsay 博士为之写了语法提要，S. Berggren 画了题花，Ehrlich 作插图，作者的荷兰世界语朋友们捐款资助这本书的出版。为了感谢这些友人，作者将他们的姓名一一开列在书中，而且在初版（1937年布达佩斯版）时特意印制了精装藏书珍版100册，内附作者照片及亲笔签名，其中75册用号码机盖印，25册为特殊纪念本。（注）

本书出版以来，在近半个世纪的时期之中，久盛不衰，迭经多次翻印，受到许多著名世界语者的高度评价、热情推荐和广大世界语者的热烈欢迎。

书中主角之一，是一个心地善良，富有才华的中国世界语小诗人依确庞，他的姐姐葵花姑娘最终也成为了世界语者，这使我们中国世界语者读起来感到莫大的荣幸和由衷的高兴。

本书的中译稿，是由黄石世界语协会首届进修班的几位同志完成的。参加翻译的，一共有六位：孙劲平同志译了《剪断了自己翅膀的艺术家》和第十一章，张友新同志译了二、九两章，俞国强、陈士方、吕鉴良同志分别译了第一、五、七章，其余部份，除第三章外，均为黄卫立同志所译。他们采取分工合作的方式，从1981年夏天开始，用了约一年的时间，边译边送给我校阅。到1982年夏天首届进修班结束时，终于全部译完，正好成为一份很有意义的毕业礼物，如今呈献在亲爱的读

者之前，使得这部汇集了各国世界语者心曲的作品，也添上了我们中国世界语者的一片心意。

中国唐代诗人曾经写过：“心有灵犀一点通”。这一点在世界语者之间是深有体会的。不同国籍、年龄、性别、职业、身份的世界语者，凭借柴门霍夫博士所创造的 Esperanto，可以在任何萍水相逢的场合一见如故，其原因就在于他们的胸中都有一颗追求人类美好理想的善良之心——“绿心”。

愿“绿心”也属于您所有！

胡国柱

一九八二年八月二十日于黄石

（注：语法提要是为将本书作为课本的教师而写的，连同各课的生词表和讲授要点，均附录于原书之后。这一部份材料我们拟在教师用的辅导资料中转载，这里不收入。

原书的插图对中国情况太不熟悉，以致将中国少年画成戴瓜皮小帽的形像，所以我们也未保留。深盼中译本读者能绘出更美好的插图来。）

Artisto, kiu Trancĉis Siajn Flugilojn

Komencanto, kiu deziras progresi, devas multe legi. Legado fortigas nian kapablon rapide kompreni, kaj ĉe skribi, ĉar per legado ni lernas la kutimojn de la lingvo kaj multajn novajn vortojn.

En Esperanto jam ekzistas multaj legindaj libroj. Sed ne ĉiuj taŭgas por komencanto. Simile, infanoj ne povas tuj ĝui la plej grandajn verkojn de nacia lingvo!

Eble, ĝuste pro bezonoj de alta arto, la vortoj aŭ la vortordo ŝajnas tro malfacilaj. Nesperta leganto ne ĝuas legadon, se li aŭ ŝi devas en ĉiu momento halti, serĉi en vortaro, pensi, kion la verkisto volas diri.

Julio Baghy, hungaro, 1891-1967, estis granda Esperanta verkisto. Li verkis romanojn, verkojn por la teatro kaj diversajn verketojn. Li estis serioza artisto, kiu multe pripensis sian arton. Sed li ankaŭ multe instruadis. Li gvidis multajn kursojn en Hungario, kaj instruadis tie preskaŭ ĝismorte. Kiam li estis juna, li vizitis multajn aliajn landojn, kie li gvidis kursojn, parolis al lokaj grupoj, aŭ ekzamenis esperantistojn. Li faris tian laboron iam en dek kvin eŭropaj landoj. Do, li tre bone komprenis la problemojn de komencantoj; kaj dum sia tuta vivo li restis granda amiko de komencantoj.

Li verkis unu belan romaneton, "La Verda Koro"

(1937), speciale por ili. La romano komenciĝas kiel eble plej facile, kaj pli malfaciliĝas nur tre malrapide. Ĝi tamen rakontas interese pri amindaj personoj. Jen la komenco,

“Lernoĉambro en siberia Popola Domo. Unu pordo, du fenestroj. La pordo estas malalta, la fenestroj estas mallarĝaj.”

Sed eĉ la fino ne estas tre malfacila,

“Kaj Nadai komencas senti, ke la maro estas senkora, kruela monstro... Ondoĵ venas, forviŝas eĉ tiun strian postsignon kaj ĝi estos tiel glata, kvazaŭ nenio estus tranĉinta ĝian supron... Adiaŭ, Siberio!”

Poste, la komencanto ne trovos tro malfacilajn liajn grandajn romanojn pri militkaptitoj en Siberio, “Viktimoj” kaj “Sur Sanga Tero”. Jen pli da vortoj, sed tiel aranĝitaj, ke oni facile komprenas, multaj interparoladoj, kiuj sonas tre naturece. Lia plej longa kaj malsimpla romano, “Hura!” bezonis iom pli diversajn rimedojn, ekzemple pli grandan vortaron, sed la lingvaĵo restas tre klara, do facile komprenebla.

Baghy verkis tutan poemaron, “La Vagabondo Kantas”, speciale por komencantoj; kaj lernantoj, kiuj amas poezion, baldaŭ povos ĝui preskaŭ ĉiujn liajn poemojn. Multaj el liaj verkoj por la teatro estas sufiĉe simplaj lingve por legado en klubejo aŭ lernoĉambro. Jen valora ekzerco pri parolado — aŭ aŭskultado — por progresemaĵ lernantoj.

Julio Baghy estis granda artisto. Artisto deziras havi kiom eble plej da rimedoj kaj la plej grandan liberecon. Sed li estis ankaŭ tre bona homo, kiu amas la homojn. Li vere amis siajn lernantojn kaj ĉiujn komencantojn — nur ne tiujn “ĉiamajn komencantojn”, kiujn — foje kolerigis lin! Pro tiu amo, li verkis, plej ofte, tre simple, por ke la verkoj estu utilaj al ĉiuj.

Li faris multajn malfacilajn taskojn por Esperanto, sed eble lia plej malfacila sindono estis tiu limigo de siaj verkistaj rimedoj. Li volis, kaj povis, flugi pli alten, sed por servi la homaron, li tranĉis la proprajn flugilojn.

Komencantoj, kiuj deziras progresi, amu lin, kiel li amis vin; studu liajn modelajn verkojn!

el p.188, n-ro 11 de 1981

“esperanto”. Marjorie Boulton

POR MEMORIGI KAJ PAROLI
PRI MALNOVAJ BATALANTOJ
KORE DEDIĈAS LA VERKETON
AL LA NOVAJ ADEPTOJ
LA AŬTORO

ENHAVO

Artisto, Kiu Trancis Siajn Flugilojn.....	I
1. La Kurso	1
2. La Instruisto Kaj Lernantino	4
3. Malgranda Poeto	10
4. Leciono En La Parko	20
5. Interesa Tago	29
6. Intima Vespero	40
7. En Vladivostok	49
8. Fabelo De Icio Pang.....	63
9. El La Taglibro De Marja	79
10. Nikolsk Ussurijska Esperanto Societo	91
11. Adiaŭ Siberio!	98
Postparolo De La Verkinto.....	106

目 录

剪断了自己翅膀的艺术家	110
第一章 讲习班	112
第二章 老师和女学生	114
第三章 小诗人	119
第四章 在公园上课	127
第五章 有趣的一天	134
第六章 亲密的夜晚	142
第七章 在符拉迪沃斯托克（海参威）	149
第八章 依确庞的童话	159
第九章 摘自《玛丽娅的日记》	171
第十章 尼科尔斯克·乌苏里斯卡世界语协会	180
第十一章 别了，西伯利亚	185
作者后记	190

1. LA KURSO

Lernoĉambro en siberia Popola Domo. Unu pordo, du fenestroj. La pordo estas malalta, la fenestroj estas mallarĝaj. En la lernoĉambro staras malnovaj mebloj: nigra tabulo, simpla tablo, unu seĝo kaj longaj benkoj. Sur la plafono estas elektra lampo. Ĝi ne estas bona. La plafono estas griza, la planko estas malpura. Sur la muroj estas instruaj bildoj. Ili montras objektojn, florojn, bestojn, homojn.

Sur la longaj flavaj benkoj sidas unu sinjoro (li estas poŝtovicisto), du soldatoj en rusa uniformo, tri soldatoj en uniformoj ĉeĥa, rumana kaj amerika, unu sinjorino, tri knabinoj en gimnazia uniformo kaj du knaboj. Ili rigardas la instruiston.

La instruisto estas soldato, sed ne en uniformo. Li estas hungaro kaj militkaptito. Li iras en la ĉambro, montras la bildojn, tuŝas la objektojn. Li instruas. La lernantoj kaj lernantinoj komprenas lin.

— Sinjorinoj kaj sinjoroj, ni parolas en Esperanto. Kio ĝi estas? Ĉu ĝi estas politiko? Ne! Ĉu ĝi estas religio? Ne! Ĝi estas kulturo. Ĉu vi komprenas?

La instruisto demandas, la lernantoj kaj lernantinoj respondas.

— Jes, ni komprenas.

— Ĉu vi ŝatas la kulturon, fraŭlino Smirnova?

kulturon.

— Mi scias kaj gratulas.

— Mi dankas.

La instruisto demandas junan rusan soldaton.

— Kiu vi estas?

— Mi estas Janis Lekko.

— Ĉu vi estas ruso?

— Ne, mi estas latvo kaj rusa soldato.

— Ĉu vi ŝatas Esperanton?

— Jes, sinjoro.

— Mi dankas... Kaj vi, fraŭlino, kio vi estas?

— Mi estas gimnazia lernantino, sed mi ne estas rusa knabino. Mi estas polino.

— Ĉu la poloj ŝatas la kulturon?

— Ho, jes, sinjoro.

La instruisto iras en la ĉambro kaj li faras demandojn. La lernantoj kaj lernantinoj faras bonajn respondajn frazojn. Nur Iĉio Pang, la juna ĉino, faras interesan respondon.

— Mi estas malgranda ĉino kaj mi scias kulturon.

— Knabo, la frazo estas malbona. Bona frazo estas, mi ŝatas la kulturon.

— Ne, sinjoro. La frazo estas bona. Mi scias, kio estas kulturo.

La sinjoroj kaj sinjorinoj rigardas la knabon. Ili ne komprenas lin.

— Kio estas kulturo? — la instruisto demandas.

— Mi ŝatas ĝin, sinjoro. Ni rusoj, ŝatas la
— Ĉu vi ne scias, sinjoro? Kulturo estas homa
kompreno. Mi ŝatas kaj lernas Esperanton. Ĝi estas
homa kompreno, kulturo.

En la simpla lernoĉambro la lernantoj kaj
lernantinoj komprenas, kio estas bona bela kulturo,
sed...sed en la Popola Domo estas ne nur lernoĉambro.
En ĝi estas biblioteko kaj teatro kaj ... kaj en la biblioteka
ĉambro ludas musoj kaj Ĥato; en la teatro ludas rusoj
kaj politiko. La kato manĝas la musojn, la politiko
manĝas la rusojn kaj ... kaj en la griza, malpura
lernoĉambro militkaptito instruas Esperanton.

— Sinjorinoj kaj sinjoroj, Esperanto estas homa
kompreno. En la ĉambro sidas rusoj, ĉeĥo, polo, latvo,
slovako, rumano, germano, ĉino kaj hungaro. Ili estas
homoj. Kiaj homoj ili estas? Modernaj homoj. La modernaj
homoj ŝatas la kulturon kaj ili lernas Esperanton,
lernas "homan komprenon".

2. LA INSTRUISTO KAJ LERNANTINO

La instruisto fermas la malgrandan libron sur la tablo. Li prenas kaj metas ĝin en la poŝon.

— Sinjorinoj kaj sinjoroj, mi deziras al vi bonan nokton — li diras — Ĝis revido!

— Ĝis revido — respondas la gesinjoroj kaj ili iras de la benkoj al la pordo.

La juna Icio Pang malfermas la pordon de la lernoĉambro kaj la gelernantoj iras hejmen. Nur la maljuna oficisto, la pola knabino kaj la instruisto restas. La oficisto estas malnova esperantisto. Li bone parolas la lingvon. Nun li kaj la instruisto konversacias.

Marja Bulski, la pola knabino, estas inteligenta lernantino en la urba gimnazio. Ŝi parolas la polan kaj rusan, lernas la germanan kaj latinan lingvojn, sed ŝi ne komprenas la longajn frazojn en la nova mondo-lingvo.

Jes, la kapo ne komprenas la vortojn, sed ŝi havas okulojn, fantazion kaj koron. Ŝi vidas du homojn; unu junan kaj unu maljunan, hungaron kaj rusan. La ruso havas nur unu manon. Kie estas la alia mano?

La fantazio faras militan bildon. La knabina koro komprenas la signifon de la konversacio. Ĉu la fantazio diras la puran veron? Kiu scias? Ŝi vidas du homojn; unuman rusan, kiu prenas cigaredon el la poŝo kaj

hungaran militkaptiton, kiu dankas kaj prenas la cigaredon el la mano de la ruso. En la okuloj de la sinjoroj parolas paca sento, kiun Marja Bulski bone komprenas.

La instruisto nun malfermas la pordon, montras la vojon. Ili iras el la ĉambro kaj haltas sur la strato ĉe la granda pordo de la Popola Domo.

— Ĝis revido — diras la oficisto kaj li prenas la manon de la instruisto.

— Ĝis revido, sinjoro Kuratov kaj bonan nokton!

Marja Bulski restas ĉe la pordo. Ŝi rigardas la oficiston, kiu marŝas al la poŝtoŝeĵo. Li loĝas en la domo de la oficejo, sed ne en la kontoro. En la kontoro li laboras.

La instruisto deziras bonan nokton al fraŭlino Marja, sed ŝi deziras konversacion.

— Kie vi loĝas, sinjoro instruisto?—ŝi kuraĝe demandas kaj faras novajn mallongajn frazojn en la kapo.

— Mi loĝas en la kazerno de la militkaptitoj.

— Mi scias, mi scias, sinjoro. Vi loĝas ne en la urbo, sed ekster la urbo. Ĉu ne?

— Jes, fraŭlino. Kie vi loĝas?

— En la strato Kitajskaja.

— Ni havas saman vojon en la urbo.

— Jes, ni havas saman vojon kaj mi estas feliĉa. Mi ŝatas Esperanton kaj mi deziras konversacion en la nova lingvo kaj ... kaj ... mi ... jes ... Ho, mi ne

scias la vortojn! Mi estas malfeliĉa. Mi ne havas bonan kapon. Mi estas malinteligenta knabino ... Esperanto estas malfacila lingvo.

— Fraŭlino, vi havas inteligentan kapon. Mi scias. La parolo, kiun vi faras, havas muzikon de la vortoj kaj la frazoj, kiujn vi faras, estas simplaj, sed bonaj. Nun ankaŭ mi faras nur simplajn frazojn. Ĉu vi komprenas ilin?

— Mi komprenas ne nur la frazojn, sed ankaŭ vin.

— Ĉu?

— Jes. Vi estas militkaptito, kiu loĝas en siberia kazerno. Vi ne havas hejmon. La homoj, kiun vi amas, loĝas en Eŭropo kaj ne en Azio. Du kontinentoj, du malsamaj mondoj ili estas. Vi, homo de Eŭropo, parolas al la homoj de Azio. Vi deziras bonon kaj feliĉon al la homoj kaj... kaj vi estas malfeliĉa.

— Feliĉa mi ne estas. Jes, jes, fraŭlino, vi bone komprenas min.

— Ĉu? Ho, mi estas feliĉa. Ne nur Iĉio Pang, la juna ĉino, sed ankaŭ Marja Bulski komprenas vin. Vi estas malfeliĉa militkaptito, sed vi estas riĉa, riĉa homo.

— Ĉu vi pensas? La poŝo...

— La poŝo, poŝo... En la poŝo vi estas malriĉa, sed en la amo al la homoj vi havas belajn sentojn, bonajn pensojn. La mondo de la homoj estas malbela,

sed en la fantazio vi faras ĝin bela, bona, paca ...
Sinjoro instruisto, ĉu mi diras la veron? Ĉu mi
komprenas vin?

La militkaptito longe rigardas ŝin kaj li ne respondas.
Ankaŭ Marja silentas.

Ili marŝas al la direkto de la strato Kitajskaja.
Estas bela vespero. Sur la larĝa strato ili vidas nur
katojn, hundojn. La homoj sidas hejme en la malgrandaj
rusaj domoj. Ili sidas ĉe la tablo en la granda ĉambro,
trinkas teon, legas Bibliion. Sur la tablo staras temaŝino,
samovaro. Ĝi muzikas: zzzzzuuu... zzzziiii ... zuzizuzi...
La infanoj ludas en la litoj. Vespero estas kaj ne nokto.
Belaj knabinoj kaj junaj sinjoroj sidas sur la benkoj ĉe
la pordoj. Ili faras muzikon kaj kantas. Paco estas en
la koroj, en la rusaj hejmoj. Bela vespero kuŝas en la
urbo.

Marja pensas: ĉu la vespero estas bela ekster la urbo,
en la grandaj kaj malpuraj kazernoj de la militkaptitoj?
Ĉu ili havas pacon en la koro? Ĉu ne malamo loĝas en
la kazernoj, kie homoj, junaj kaj maljunaj, sanaj kaj
malsanaj, kuŝas kaj rigardas nur al la nigra plafono,
al la grizaj muroj kaj kie la pesimismo faras malbelajn
bildojn?

Marja ne havas vortojn kaj kuraĝon al la demando.
Ŝi vidas malaltan domon en la strato kaj ŝi montras al
ĝi.

— La domo de sinjorino Bogatireva. Ŝi sidas ĉe la